# Raporto pri AMO-seminario 92 en Havano, Kubo

*La temo: Postpandemia restarto en Kubo.*

Tagoj: 7-8 oktobro 2022

Kiel planite okazis la havana sesio de AMO-seminario en la Nacia Sidejo de KEA. Ĝin partoprenis 14 geesperantistoj el Havano plus unu el la centra provinco Villa Clara.

## Seminario 92 en Havano

La malferma sesio okazis vendrede la 7-an je la 4-a horo ptm per vortoj de la prezidento, s-ro Alberto Fernández-Calienes.

Sekvis informo pri la proponata programo konsistanta el 4 temoj:

- **Temo 1.** Esperanto-instruado, kiu inkluzivis jenajn subtemojn: Eo laŭ komunika metodo; rilatoj inter ĉefaj komponantoj de la metodo; kaj la lernociklo dum la instruado de Esperanto. Kaj ekzercotipoj.
- **Temo 02:** Kiel organizi informan laboron? (inkluzivis interaktivan agadon
- **Temo 03:** Kiel efike varbi en komputika erao? Sociaj retoj. (inkluzivis interaktivan agadon)
- **Temo 04** – Kiel flegi la asocian vivon. Organizaj demandoj.

Fine okazis forumo kiel resumo de la laborsesioj kune kun la transdono de atestiloj.

**Temo 1:** La trejnisto por temo 1 estis profesoro Julián Hernández Angulo. La programo estis plenumita laŭ planite kaj en la sabata sesio la trejnatoj aktive partoprenis ĉiujn programerojn.

**La temo 2** estis sub gvido de Maritza Gutiérrez González.

Temo: Kiel organizi informan laboron? (inkluzivas interaktivan agadon)

Orientita al ekstere. Kiel sin prepari por efike informi pri Eo? Kiel rebati aŭ kontraŭargumenti kritikojn aŭ atakojn al Esperanto? Oni ne vere povas kontraŭargumenti atakojn se oni ne havas la faktojn. Surbaze de grupa laboro oni trejniĝis kiel plej bone tion fari.

Listo de materialoj studendaj por esti bone informita: materialoj estis kolektitaj kaj transdonitaj). Graveco flegi rilatojn kun gazetaro kaj amaskomunikiloj. Sinpreparo por esti intervjuataj.

La trejnatoj efektivigis ekzercon: 5-minutaj dupartneraj intervju-ekzercoj (preparo por interparolado kun ĵurnalisto kaj por radio/televido)

**Temo 03:** Kiel efike varbi en komputika erao? Sociaj retoj.




Tiun ĉi temon prezentis Ariadna García Gutiérrez (sur la foto).

Ĝi estis orientita al ekstera komunikado (publiko ne esperantista) kaj prezentis la eblon uzi la sociajn retojn kaj ĝiajn avantaĝojn por la esperanto komunumo. Kiel utiligi ilin en konstanta profitdona dialogo cele al respekto pri lingva diverseco. La sesio inkluzivis aktivan partoprenon de la trejnitoj.

**Temo 04** – Kiel flegi la asocian vivon. Organizaj demandoj. La temo estis prezentita de Maritza Gutiérrez. Ĝi okazis kiel forumo kun aktiva partopreno de la trejnitoj. Oni interparolis pri la ĉefaj defioj de la movado en la nuna epoko nialande. Post la pandemio, oni konstatas ke ege malfacilas restarigi la asocian vivon kaj kursojn, tamen, oni konsideras pliintensigi la lokan agadon kaj kluban vivon. Kursoj multnombraj ne okazos kaj nepras ŝanĝi la labor-dinamikon tiucele kaj ankaŭ plu diskonigi la lokajn kursojn kaj renkontiĝojn. Gravas agi optimisme kaj bone planante kaj organizante la laboron. La nuna momento postulas laboron, utiligi la nunajn eblecojn de teknologio kaj labori teame.

**Konklude**

La AMO-seminario 92 en la unua sesio en Havano, sukcesis plenumi siajn programon kaj celon dum du intensaj laborsesioj. Atestiloj estis disdonitaj al ĉiuj trejnatoj. Kultura vespero fermis la AMO-sesion.

KEA finance subtenis la tutan loĝistikan flankon de la Seminario.




Dekstre: La nacia sidejo, kie okazis la seminario.

Raportas: M. Gutiérrez
Havano, 25/10/2022